



# La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio  
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 136 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. NOVEMBRO, 1931

## “TRIDEK JAROJN EN LA ORA NORDO.”

Jan Welzl al la mondo rakontas.

En 1893 iu ĉeĥo, flamiĝinta pro ardo al akiro de riĉaĵoj laŭfame troveblaj en la Arkto, piede ekiris de Irkutsk norden trans Siberion. Tio estis por li longa, riskplena vojaĝo, kiu fine kondukis al 30-jara vagloĝado inter tiu stranga popolo, kiun tenas la glacivastoj kuŝantaj de Kanado ĝis Nova Zemlja.

Ĝisfunde li konas la Eskimojn. El mirinde funkcia memoro li prirakontas ilian malpurecon, kompletan amoralcon (mankon de ajna seksmorala sento), mallongan vivpovon, la ĉiupaŝe variajn dialektojn, kaj la barbaran ĥirurgarton, laŭ kiu ili uzas kiel flikojn por la amputitoj karnon de kompatindaj infanetoj.

Li revenis al la patrujo en 1926, kaj ekironte denove al amata Nordo, pensis, ke ĉagrene estus morti tie ekster la civilizo sen antaŭa transdono al posteula mondo de la stranga historio nestanta en lia cerbo. Tial, li venigis al si du ĉeĥajn ĵurnalistojn, ke tiuj steno-grafu rekte el la buŝo. Tion ili faris, zorgante per trafa demandado, ke la disvolviĝanta vivaventuraro iru sur glata relo. El tio ĉeĥa libro naskiĝis, kun frapa sukceso.

Jam ni havas Esperantan tradukon. La stilo estas naive simpla; nenia provo ornami faktojn per florbukeda lingvaĵo. La krudeco, ja bruteco, kion estigis en tiu ĉi bonhumorulo la malfacila vivado, ofte sin trudas al leganto. Lia Aŭgea arigo de malbonegodora kaverno de eksloĝintaj Eskimoj, lia puna mortbruligo al vendistoj de venenlikvaĵo, vomemigas ordinaran homon per nura lego. Alie en la libra enhavo levigos la brovojn al kelkaj legantoj pro forta dubo, se ne rekta nekredo. La aserto

pri la Malemute Kid kaj la kanguruo pensigos multajn pri tio, ĉu vere tiu besto povus elteni la morte-malvarman klimaton de la Arkto? Tamen, fininte la volumon, eĉ tiuj kritikantaj konsentos kun la recenzanto, ke ili ĝuis la plej eksterordinare interesan vojaĝrakonton ĝis nun verkitan en Esperanto.

Unu el la impresoj donitaj de la verko estas tio, ke la kompatindaj Eskimoj, fundiĝintaj en la plej kruela bestbarbareco, per siaj naŭzaj, korŝiraj fikutimoj, elokvente atestas sian bezonon de spirite puriganta kulturo. La absoluta manko de ia interfamiliana korligo, la terura forĵeto de infana vivo, la porkeja anarĥio intersekse, estas nepre aferoj, kiuj devas esti foredukita en la nomo de sana homaro. La perversaj eksperimentoj de fihomoj, kia la hundbredisto Kid, estas konformaj kun la eksterleĝa vivo, kiu karakterizas la senpolican neĝvaston. Feliĉe ekestas lumo, en tio, kejam la Soveto atendas la aŭtoritatan manon super tiu regiono. Negrave, kia politika opinio sidas en la koro, ĉiu homo ne povas ne konsenti, ke per tio almenaŭ le plej abomenindaj trajtoj de ilia senkultura vivo estos forviŝitaj al la Eskimo.

La cerbofrakasa fenomeno de la glacimara diskreviĝo; la brila gajaĉeco en Nome kaj Dawson en la orfrenezo de 1898; la mortriska veturo laŭ la Yukonrivero; la teruroj de la Chilcoot-Pasejo; la spirita febro, kiu plenmane ĵetis for sumegojn kontraŭ varo kaj servo; ĉion ĉi Welzl priskribas kun la sincereco de homo, kiu ja tremvibras tra la realo.

La traduko, farita de la Moraviaj Esperanto-Pioniroj, dediĉe al Mr. John Merchant, prezidanto de la I.C.K., estas bonega. Ĝi fidele spegulas la parolmanieraĵojn de la simplanima rakontinto, kaj sendube servos kiel bazo, laŭ

kiu oni revestos ĉi tiun modernan Odiseon en la idiomojn de malgrandaj popoloj, ĉe kelkaj el kiuj povas esti, ke nur malfacile oni trovas homojn kompetentajn traduki laŭ la ĉeĥa originalo.

La jenaj vortoj estas nekompreneblaj almenaŭ por anglo: pimplo, tvirnaj, mosheroj. Formaj aŭ sencaj devioj for de la S.A.T. Plena Vortaro: kopejk', prospekt', prostit', dimens', stift', pres-taj', hronometr', parti', hareng', tetu', marŝal', linole', drez', frunt', fret', ken-guru'. Ŝerifo laŭ Boirac estas araba aŭ maŭra princo, ne usona "sheriff." Neologaj vortoj: kajuzo, sinamona, leadro. Bonven' estas netransitiva; hard' terur', glor' kaj honor' estas transitivaj. Dekses ekzemploj troviĝas de radikoj uzitaj kun neĝusta signifo. La formo "kelka homo" anstataŭ "iu homo" kaj similaj ne plaĉas.

Kvin ŝil. nebindita, ses sil. bindita. 320 paĝoj, 16 x 22.—Robo.

### A WORD TO THE WILTING.

Idealism, defined here as the will to clothe with reality a noble idea, even at the cost of time, money and travail, is, one must fear, a hothouse plant with many of us, and can burgeon only in that warmth of spirit afforded by freedom from economic cares. The slow gnawing search for the ever more elusive means of livelihood, the shrunken annuity of them that fear that the barrier erected against a poverty-stricken old-age is crumbling before them—all the stress of life in these days of pressure—quickly restricts the souls of men who normally would feel their hearts expanding in search of some object outside their mere self-interest. Many of those who joined the Esperanto movement in a warm surge of enthusiasm are now subject to the withering influence of the present depression, which is inhibiting in them the play of a splendid instinct—the urge to share consciously in the evening of the world's rough places for those that follow.

The leaves of the subscription book impart to one charged with the life of the "Suda Kruco" a mingled sympathy and disappointment when he makes the tale of such spiritual casualties. Some of these who have, as lapsed subscribers, been receiving the paper for years, are, it seems, so bound to the wheel

of circumstance as to find it outside their power even to acknowledge to the administration receipt of it. Now, it would be satisfactory to know if the paper is appreciated by these silent recipients or not; whether it is carefully read and filed, or consigned to a more or less degrading annihilation. As some thirty pounds is outstanding through this indifference, we feel justified in regarding it as a matter that calls for their attention.

But there are encouraging offsets. In the same spirit that lighted the eyes of their most penniless "Majstro," there are friends of "La Suda Kruco" who, in clear recognition of the facts and their implications, are denying themselves to defend from the blast the sacred flame he lighted. They are of the company of those brave spirits, the glow of whose unchronicled sacrifice is diffused through the pages of Esperanto story.

It is well that there is sufficient strength of esperantist spirit behind the paper to hold on in the belief that, with the passing of the present difficulties, the fossilizing names in the address book will receive a new, flesh-and-blood significance, and that their owners will be inspired with fresh fervor to raise the torch now fallen from their tired hands.

### KRONIKO.

**Palmerston North, N.Z.**—Estas ĝojige kroniki, ke post ampleksa parolado publika de s-ro R. Ross en aŭgusto, fondiĝis dekkvar-ana E. klaso sub la aŭspicio de la Laborista Eduka Asocio (W.E.A.). Kapable gvidata de s-ro Ross la klaso firme progresas. Gratulon!

**Wanganui, N.Z.**—S-ro S. Nolan, malnova amiko de E., gvidas klaseton tie ĉi. Li celas pligrandigi la anaron en 1932. Lia espero realiĝu!

**Papatoetoe, N.Z.**—Per la energio de f-ino E. Lindquist (ĉe 7 Wallace-rd.) rondeto de amikinoj kunvenas por studi E-ton. Trovinte la lingvon interesa, la rondanoj brave progresas, malgraŭ bedaŭrinda manko de kompetenta spertulo.

**Masterton, N.Z.**—Nian grupon vizitis en septembro la mondvojaĝantoj s-roj Kotulsky kaj Masluk, Latvoj. La sinjoroj estis gastoj de nia grupo je tagmeza manĝo en la ĉambraro de la Junu-

lara Kristana Asocio (Y.M.C.A.), kie staris tabloj belaranĝitaj, en la mezo de kiuj estis granda verdstelo el floroj kaj folioj. Gastoj kaj grupanoj kun reciproka plezuro vigle interparolis. Antaŭ adiaŭo, la vizitantoj informis pri la E. movado kaj esprimis dankon, precipe al s-ino Dewar, kiu aranĝis la tablojn kaj preparis la manĝon. Aperis en la taggazetoj taŭgaj raportoj, kiuj impresis la urbanojn pri la utileco de E.

**Wellington, N.Z.**—En urbrondoj jam graviĝis la loka klubo tiomgrade, ke tagĵurnaloj nun donas klubraportojn sub dulinia rubriko. La klubo kunvenas ĉiumarde por hor-longa instruo, post kio sekvas paroladoj, komedioj k.t.p.

**Upper Beaconsfield, Vik.** — S-ro Flanagan fondis grupon ĉe la ŝtatlernejo. Ĝi konsistas el dudek anoj.

**Bendigo, Vik.** — Grupeto estrata de s-ro Wookey.

**Melbourne, Vik.**—En Scots' Church Hall je la 3a de Oktobro okazis danc-festo, kiu estis tre sukcesa afero, kaj oni multe bedaŭris, ke ĝi estis la lasta en la jaro.

Ĉe la Melb. Societo okazis debato je la 20a de Oktobro. Ok anoj partoprenis kaj debatis pri la temo "Ke la noveloj de la 20a jarcento estas pli bonaj ol tiuj de la 19a." S-ro Ballard, pli juna, afable konsentis aljuĝi, kaj li donis la plej multe da poentoj al la jesa partio.

## ANOTHER VICTORY FOR ESPERANTO.

Dr. F. Williams, Samarai, Papua, sends the following:—

"Some years ago my wife lost touch with relatives in Canada. In spite of attempts on the part of both parties to communicate with each other no success resulted.

"Recently I decided to see what could be done through the Universal Esperanto Association. I wrote to the delegate in Vancouver, British Columbia, where the relatives had last been heard of, sending full particulars.

"Soon a reply came back that the relatives had been located. Now, to the delight of all concerned, a correspondence interrupted seven years ago has been resumed."

**Postal Institute Esperanto Class.**  
(From our Brisbane Correspondent.)

As a result of a heavy reduction in the Government subsidy paid to the Postal Institute, during the last year or so, educational activities have been curtailed. Unfortunately, some classes had to be abandoned, while others struggled along under difficulties. Since the depression set in, however, a new class has been formed, at which Esperanto is taught. The pupils are under the tutorship of Mr. A. M. Hyde, F.B.E.A., a leading authority on this subject in Australia. A knowledge of Esperanto is no mean accomplishment. It serves as an introduction to the study of other languages, and its value as an international auxiliary language has long since been recognised. Esperanto is useful to the student of international affairs, and to others who are fond of reading, as it makes available to readers a quantity of literature which is not obtainable in English.

(From the "Federal Public Service" Journal, 31/7/31.)

## LA DISFENDITA LANGO DE LA LACERTO.

El la papua lingvo  
tradukita de Pastro A. H. Lambton.

Iam estis lacerto kaj pigo, kiuj en la sama domo loĝis. Ili estis bonaj kunuloj. La manĝaĵon, kio ajn ĝi estis, ĉu rato, aŭ serpento, aŭ fruktoj, aŭ kion ajn ili kaptis en retoj aŭ aliaj kaptiloj, pri kies uzo ili bone komprenis, ili ĉiam porciigis amike.

Okazis, ke ofte ili forlasis nutraĵon en la domo, kiam ili eliris. Unu tagon, elirante al rivereto por naĝi, bonan manĝaĵon ili metis kaŝitan en la domo. Survoje la lacerto, sentante sin malsata, diris al sia amiko, "Mia amiko, aŭskultu. Mi scias la lokon de verdaj formikoj. Hieraŭ mi vidis grandan neston. Mi forlasos vin, por mallonga tempo, por havigi ĝin al mi. Ne min atendu; baldaŭ mi vin ĝisatingos. Mi estas malsata, kaj sopiras formikojn kaj ankaŭ iliajn ovojn." "Certe," respondis la pigo, "iru kaj alportu la frandaĵon, por ke ni ĝin ĝuu post nia bano."

"Bone," respondis la lacerto kun ruza rideto. Li sin returnis kaj iris rapide tra la herbaĵo, sed anstataŭ serĉi

formikojn li faris ĉirkaŭiron al la loĝejo, kie estas la manĝo, kaj tie avide manĝis la duonon. Poste li returne atingis sian amikon, kiu estis jam en la akvo. "Kie estas la formikoj, kiujn vi promesis alporti ĉi tien?" demandis la pigo. "La nesto ne estas havinda, kaj mi ĝin forlasis. Ne ĝenu vin pri ĝi. Ni naĝu."

Post la naĝo ili iris returne hejmen. Malferminte la pordon, ili vidis nur duonon de la nutraĵo. La surprizo de la lacerto, kaj la malbenoj, kiujn li eligis el sia buŝo, pli ol egalas la eksciton kaj furiozon de la pigo.

De tempo al tempo la lacerto agis sammaniere, farante pretekstojn por lasi sian amikon, kaj revenante hejmen por ŝteli la ĉefmanĝon. Fine la pigo eksuspektis pri la tre oftaj pretekstoj de la lacerto; li ekkunigis la pretekstojn kun la malapero de la nutraĵo. Sed li tenis sekrete sian opinion kaj decidis starigi ruzon, por eltrovi la kulpulon. Poste, kiam ili eliris laŭ sia ordinara kutimo, la pigo decidis fari pretekston por lasi la lacerton kaj reveni hejmen, por starigi bone elpensitan ruzadon. Li antaŭe kaŝis en la domo malgrandajn sed akrajn pecojn la obsidieno (F. obsidienne. Substanco, kiu devenas de vulkanoj, similanta botelvitron), kiujn li nun prenis kaj zorge metis en la plej bonan nutraĵon, kaj, farinte tion, li tuj reiris al sia kunulo. Tre baldaŭ poste la lacerto denove faris pretekston, laŭ sia kutimo, kaj, lasante la pigon, revenis al la loĝejo kaj manĝis avide la duonon de la preparita nutraĵo. Dum li manĝegis, la pecoj da obsidieno tranĉis al li la langon en la mezo laŭlonge. La tranĉo, kaj la gutetoj da sango sur la tablo, konsternis lin. Kion nun li devas fari, por kaŝi la makulojn, kiuj kondannos lin. Lavu ĉion? Jes, sed la sango sur la buŝo! Kion diros la pigo pri lia disfendita lango? Longan tempon li atendis la ĉeson de la sangado, sed vane. Survoje returne al la pigo li iris malrapide, tre malrapide, sentante sin honta, ne pro tio, ke li estas ŝtelisto, sed ĉar lia malbona ago eltroviĝos. Fine li alvenis pigon, kiu tuj vidis la signojn de kulpeco sur lia buŝo. "Kion vi faras je via buŝo? Sango ĝin kovras." "Estas nenio," respondis lacerto. "Dum mi trapenetras la arbaron akra dorno trapikis kaj ŝiris al mi la langon." "Ho mia amiko! Mi bedaŭras, ke vi tion faris, sed ni tuj returnu hejmen,

por ke mi ĝin pansu (F. panser, prikuraci, bandaĝi vundon). Mi rigardu: Ho terura, terura, via lango estas disfendita. Ni iru rapide. Venu!"

Kiam ili alvenis hejmon la pigo vidis la kutiman vidon pri la ŝtelita nutraĵo. Ankoraŭ unu fojon iu ĝin manĝis dum ilia foresto. La pigo, rigardante la duonmalplenan poton, diris al la lacerto. "Kiu faris tion? Ĉu tiu ĉi sango estas la via aŭ ne?"

"Mi ne povas nei mian kulpon. Mi intencis forviŝi la sangmakulojn, sed mi tion forgesis."

"Jes, nun mi trovis pruvojn de via kulpo. Vi estas tiu, kiu ĉiutage sekrete kaj senhonte manĝegas nian manĝon. Mi nun rifuzas pansu por vi la vundon, kiun vi ricevis pere de la por vi preparita nutraĵo. Foriru kaj neniam plu proponu al mi amikecon. Tiel longe nia amikeco restos disrompita, kiel longe ankaŭ via lango restos disfendita."

De tiam ĉiuj lacertoj portas du pintojn al la lango, ĉar la lacerto kaj la pigo neniam amikiĝis plu.

[Ni plezure dankas al s-ro Lambton por lia supra verketo. Per ĝi li ebligas al la mondo iom rigardi en la naivan koron de la papuanoj, inter kiuj li laboras kiel anglikana misiisto ĉe Gedularara, voje al Samarai. Ankoraŭ unu traduko lia aperos. Tiuj, kiuj eventuale klopodos kompili antologion el kiel eble plej da lingvoj, tre povos profite konsideri ĉi tiujn literaturaĵojn el malmulte konata popolo. Red.]

### TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following. Accounted in the last issue:—Mr. Hayes-Williams, 10d. in stamps; Dunedinano, 1/-; Mr. G. Bird, 4/6, Aug., '32; Mr. C. Clarke, 4/6, May, '32; Miss P. Abbott, 4/6, July, '32; Miss J. Pollock, 5/-, July, '32; Mr. Bishop, 2/3, Feb., '32; Mr. F. Taylor, 5/-, Oct., '32; Mr. H. Franks, 4/6, Nov., '30; per Miss Carrick, sales, 3/4.

Mr. C. Smith, 9/-, Dec., '31; Anon., 5/-; Mrs. Tondut, 4/6, June, '32; Mr. A. Roberts, 4/6, Oct., '32; Miss E. Griffin, 4/6, Oct., '32; W.E.S. (advert.), 5/6, July, '32; per Miss Griffin, sales, 2/-; Mr. Pudney, 2/3, Feb., '32; Mr. H. Walker, 7/-, Mar., '33; Mr. K. Simmons, 10/-, June, '35; Mrs. Dunne, 4/6,



May, '32; Sydney E. Soc., adv., 5/6, Aug., '32; Dr. Williams, adv., 2/-; Exchange on N.Z. notes, 7/5; Mr. Byatt, 10/-, July, '33; Mr. A. Towscy, 4/6, Oct., '32; Mr. T. Enderby, 8/-; Mr. D. Haccou, 5/-, Oct., '32.—Total £5/1/2.

### 3rd N.Z. CONGRESS.

Arrangements are now in train to hold the Third New Zealand Congress at Christchurch. At time of writing the N.Z.E.A. Executive had not authorised one of the two congress programmes proposed by the Christchurch Esperanto Society, but it is certain the congress will take place during the days immediately following Christmas. As in the past, the N.Z.E.A. will issue separately invitations to all known New Zealand Esperantists and sympathisers.

### ESPERANTO ON THE MARCH.

Since our last issue we have learned—

That (Nov., 1930) the membership of the Soviet Esperanto Union is 5116 in 687 places. The union has opened a recruiting offensive to gain 10,000 active members by the end of 1931.

That Japan has four Esperanto magazines. "Esperanto Kiboŝa" is the largest, with a monthly edition of 14,000 copies. Who said Orientals would never learn Esperanto?

That Berlin has made Esperanto an optional subject in 25 public schools, and there have been so many enrolments that a marked shortage of teachers is felt. If these can be found to meet the demand Berlin will have thousands of young Esperantists within three years.

That a generation ago books and pamphlets in Esperanto were published at the rate of one a month. To-day there is a production of one a day!

That Esperanto textbooks are now available in 55 languages, of which five were added last year. Manuscripts for five more are ready to be published.

That yet another street has been honored with the name of the inventor of Esperanto. The Krakow (Poland) thoroughfare hitherto bearing the name Niecala-street is now adorned: Ulica Dra Ludwika Zamenhofska.

### "JARMILOJ PASAS"

(Volumo Dua)  
de Hermann Haefker.

Eldonita de "Heroldo de Esperanto"  
Koln, Germanl.

Prezo: 8 ŝil. por aparta vol., 13 sil. per kune bindita. 500 paĝoj entute, kun artaj reproduktaĵoj kaj geografiaj skizoj. Leda dorsbindo.

La kompletiga volumo de rimarkinda entrepreno, mondhistorio originale verkita en Esperanto. Ĝi estas farita de homo, kiu, pro sia forte esprimita personeco kaj provokanta opiniaro, tre povos trafi en maron da disputoj rilate al ĝia pensenhavo. Ambaŭ ortodoksaj kristano kaj marksano, legante la verkon, sentos en si ofendon al siaj kredoj, kaj ektenos al dialekta glavo, por defendi ilin.

Sed malsame ol Carlyle, Marks kaj Buckle, kiuj prezentis al la mondo ĉiu sian apartan interpreton de la homa historio, Haefker ne donas sub formo de nete ĉizita teorio ian novan kontribuon al la scienco soci-evoluata. Piprante la tekston per siaj konstatoj, li estas kontenta nur pentri la miljarlongan dramon de l'rasoj kaj popoloj; li ne forĝas por si propran kadron el fera teorio, en kiun li povu enpreme aranĝi la ŝajne haosan mason da eventoj. Almenaŭ li ne igas ion tian substreke rimarkebla. Kion do li nove instruas? Funde li estas kredanto je la fina venko de la Homo kontraŭ la materiaj kaj precipe spiritaj fi-fortoj, kiuj, jam de la hom-ekstiĝo, konstante minacas sub mil formoj la sanan evoluon de la kolektiva animo. Li vidas fariĝanta mondon porĉiame pacan; laŭ li, la popola volo al la granda milito estis "nursole la profunde homeca indignego pri tio, ke la paco estis rompita, ke bruta perforto kuraĝis perturbi la pacan konkuradon de la popoloj." Lia optimismo sin streĉas eviti konfesi probablecon de ĉieprofetata klasmlito. El tio venas la frapa aserto, ke "la estonta pacigita mondo estos sintezo de la kontraŭeco Ruslando-Ameriko, bolŝevismo-kapitalismo... Socialismo nenie estas kontraŭ de kapitalismo, sed ĉie nur la kontraŭo de troigita, degenerinta sed evolukapabla privatkapitalismo." Per tio li malamikigas al si ĉiun marksanon.

Sed al la "forsonanta kristanismo" li asignas nenian rolon en la nova epoko. Tio estas forte diskutbla. Ĉi tiu religio, kiu malgraŭ ĝia disa organiziteco kaj multsekta apartiĝemo, estas mistere vivipova, kaj regas per certaj fundamentaj kredbazoj la korojn de milionoj ĉe la plej kulturaj popoloj, ne povas ne efiki iagrade sur la antaŭen-marŝon de la homa raso. En nenombreblaj kazoj la kristana kredo pli-malpli influos sur la manojn de unuopaj homoj, kiuj trovos sin gvidantaj ĉe gravegaj historiaj decidoj.

La dua volumo malfermas je la hufbatoj de kavileroj forrajdantaj al krucmilito; ĝi fermas je la martelado de proletoj konstruantaj tutnovan socion. Brile la aŭtoro priskribas la malkovradon de ankoraŭ pli vastaj mondoj. La spirita gajno el la cetere kruelaj militiroj al Sankta Lando, la trovo al Ameriko, kaj ties grandega efiko sur la sorton de Eŭropo, la vica kaj foje kolizia ekspansio de la ĉefpotencoj al Azio-Afriko, ĉio-ĉi tenas varme la imagon de leganto.

La Reformacio estis "multe pli grava ol la Renasenco;"...dum ĉi lasta "revivigis forgesitajn trezorojn kaj pensformojn" la verko de Lutero "alportis novan pensmanieron."

La sanga furiozo de la franca revolucio "ekmartelis en la cerboj por ĉiuj tempoj, ke ne ekzistas sociala beno, dum iu resto da homoj estas eligita el la vere egale libera kaj frata partopreno en la bonoj de la kulturo."

Sur la paĝoj pri la milito (1914-18) kaj posta tempo, la aŭtoro lasis al sia spirito esprimon en plej arda lingvo. Lertplume li donas birdokulan perspektivon de la buĉado; denuncas la perfidan neplenumon de la Wilson'aj Dek kvar Punktoj; forte rebatas la maljuston fiksi militkulpon sur unuopan nacion; montras absurdon de la "reparacia" plano kaj ties nepran haosefikon forme de mondvasta senlaboreco.

La libro bezonas streĉan atenton ĉe la legado, ĉar plejparte kaj stilo kaj pensmaterialo pezas. La recenzanto ne volas diskuti apartajn lingvaĵojn sed volas nur demandi, kial s-ro Haefker ne sekvis Zamenhofan konsilon (Originala Verkaro p. 92) ĉe transliterigo de "Commonwealth" kaj "Smith," nome "Ko'menŭelt(h)," "Smit(h)." Fine, kio signifas "interboigon" (p.140, lasta linio)?—Robo.

## "PRINTEMPO EN LA AŬTUNO"

Originalo de Julio Baghy.

114 paĝoj, prezo 2ŝ. 3p.

Eldonita de Heroldo de Esperanto, Koln.

Estas ne necese, ke Baghy metu la nomon ĉe siaj verkoj; lia frapa personeco riĉe eksudas el ĉio de li skribita. Jen tipa cerbfrukto de la genia hungaro; naĝas en la teksto "taŭzitaĵoj kaj mienoj," "sortnuelo," "vivŝajno," "zorgpelo" kaj multo cetera el liaj jam konataj stileroj.

La rakonto estas mallonga, dolĉa. Ĝi atestas la fakton, ke en la koro de la junaj ĉeffiguroj la spirito de Adam-Eva, kun Edena freŝeco, senmakule transvivas ĝis la nuna tempo. Ni legas simpatie la profetan vorton de Baltazar al la gimnaziano en la foirbudo, kiam ĉi tiu por la unua fojo ekvidas Suneton, la molokulan vagknabinon; la disvolviĝon de l'Amo, tiel neoponeblan, tiel rememorigan pri Paŭlo kaj Virginio; la klopodojn de la Lerneja Instruo kateni la junviran spiriton per banala konakiri; la rifuĝon de la turmentata animo sub arbara ŝirmo, por ensorbi ties Diecan silenton; lian tiean verkon de poemo, kies forblovitajn paperojn korpon kaptas el la vento la objektino de lia sopiro; la sekan sed sinceran komprenon de liaj profesoroj, ke la knabo efektive envivas printempon de l'amo malgraŭ aŭtuna jartempo.

Estas multe da kortuŝaj epizodoj, kiuj ankoraŭ pli kroĉigos la koron de legantoj al tiu de la aŭtoro—ni aludas ekzemple la angoron de la pajaco Fridolin, kiam li ekkonscias, ke aliulo ame forprenis la koron de Suneto for de lia patreca; la plenan sindonon de ŝiaj du maljunaj protektantoj. Tio kaj cetero emigas nin danki al Baghy pro tio, ke li almenaŭ iommezure helpas konservi ĉiamverda en la homa koro la "plej grandan el ili" (1 Kor. 13/13).

La fina necerteco pri la sorto de la amanta, adiaŭanta duo; la alporto piedon al apudvoja Kruco de la blankaj floroj, destinitaj, timinde, por garni la tombon de l'Espero, tio ĉio estas vea bildo el multpersona vivo.

La verko estas tamen esence inspira; ŝajnas, ke la internaj okuloj de la verkinto trapenetas optimisme le murojn de ĉi-tera vivo, kaj legas racion en la homa sortkirlo. Li ne povas reteni

sian fundan emon elpentri la propran filozofion, eĉ en kelkpaĝa libreto. Tio rezultigos ĝenan haltigon al multaj legantoj, ĝis kiam tiuj povos travadi longan spacon de por ili iom tre nebula vortmaro.

19. "Respektive," kiel iuj aŭtoroj ĝin uzas, estas nekomprenebla por anglo-lingvano, ĉar la angla signifo de la vorto estas tute alia; 5, 49, "ŝtelis sin" estas stranga; 51/2-3, legu: "la lipoj de la knabino senvolan ĝemon lasis for"; 67, "kiu mensogis sin mia vivo-celo" estas nekomprenebla (komparu 68/6); 100/14-15, donita(j) kaj akceptita(j); nana (F. nain, A. dwarfish); darfi (G. durfen, esti ricevinta permeson. La aŭtoro montras kiel kutime sian lingvan lertecon, sed ankoraŭ ni atendas de lia plumo la libron, kiu, ni kredas, superos lian "Viktimoj."

—Robo.

### COMPETITIONS.

The Redakcio will forward one bound volume of

En Okcidento Nenio Nova (Re-marque), or

Tridek Jarojn en la Ora Nordo (Welzl)

to the person who forwards the subscription money for four new members before the end of January.

To the person who forwards the subscriptions of three new readers by that date will be offered the choice of

Du Majstraj Noveloj (Storm)

Baha'u'llah kaj la Nova epoko (Esslemont), or

Aelita (A. Tolstoi).

Now then, Course-leaders!

The winner of the competition announced in the August number was Miss B. Blyth, Victoria-av., Surrey Hills, Vic., who correctly indicated the identity of "La Granda Poeto" and the source of the translation. (1) Shakespeare; (2) Sonnets cliii, cliv.

### PRI REPRESOJ el "Heroldo de Esperanto."

Antaŭ iuj monatoj amiko skribis al ni, plendante, ke ni represas en La S.K. paragrafojn, informojn el "H. de E." Li opiniis tion nesaga refaro de sama laboro, ĉar li kaj verŝajne konsiderinda parto el la S.K. abonantaro ankaŭ ricevas la eŭropan gazeton.

Ni nun povas informi legantojn, ke el la 3100 abonantoj al "H. de E." nur naŭ sin trovas en Aŭstralio! Sekve, represo el tiu organo estas tute ne laboro neutila en ĉi tiu lando; ni, la administracio, firme kredas, ke almenaŭ okdek p.c. de la Sudkruccano neniam legas alian gazeton ol la aŭstralia.

Esperable estas, ke kiam fine jam forpasos la nuna ekonomia plago, legantoj de La S.K. povos pli ĝenerale aboni la entrepreneman eŭropan ĵurnalon kaj ties belajn eldonaĵojn pli rekompence subteni.

### "Tutmonda Kolektanto"

La sola gazeto por kolektantoj. Redaktas D-ro Jozefo Takacs. Administracio en Jablonne n. Orl., Ĉ.S.R.—Aperas dumonate. Abono 0.40 dolaro aŭ egalvaloro. Specimenumero kontraŭ respond-kupono.

"La Suda Kruco" rekomendas.

### NEW PRESIDENT OF LANGUAGE ACADEMY.

With pleasure we announce that Mr. J. M. Warden has been elected president of the Esperanto Lingva Akademio in the stead of the late Professor T. Cart.

### CORRESPONDENCE.

T. in H.—"Unu grandan ronkon familian." Press error for "rondon."

Al ĉiuj, kiuj sendas jarabonon, mi kalkulas sendi po dekdu numeroj de La S.K. (red.).

## KVAKERISMO KAJ PACO

Mi havas senpagajn specimenajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj Paco por disdoni.

Bonvole petu per ilustrita poŝtkar to aŭ letero. Ankaŭ mi sentus plaĉon ricevi nomojn-adresojn de eventualaj korespondantoj el plej malproksimaj mondpartoj.

DR. FRED. J. WILLIAMS,  
Samarai, PAPUA.

(fratorganoj afable represu)

## "PRI LA PRONONCADO EN ESPERANTO."

(Krysta Ludw.)

Mondlingvo-Eldonejo, Katowice, ulica Plebiscytowa 25, Ĉeĥoslovakio.

Nepre atentinda libreto 30-paĝa, verkita de homo, kiu akrasente plendas pri "fakte ekzistanta sed ne necesa malagrablo," nome ĝenerale neĝusta, nacieca prononcado de Esp-o de ĝiaj diverslandaj parolantoj. Preninta kiel bazon de sia traktateto la naŭan regulon de la Fundamento, s-ro Krysta avertas pri gravdangero, en tio, ke povos veni dialektiĝo de nia lingvo, ĝuste pro la nomita fuŝo. Li montras ateste al la jida, ĉina kaj germana lingvoj, kiuj, kvankam skribataj same tra la koncernaj landoj, estas vastdiference prononcataj. Li kritikas bedaŭrante la "ne atenditan malsamecon" de la naciaj Esp. gramatikoj, kaj voke petas, ke oni substituu tiun malĝustan instruon per vere internacia normo.

La konsilo al angloj: ne parolu do, "Li estas bedisto de kotbidoj" (li estas bredisto de kotbirdoj) ŝajnas netrafa. La angla E-tisto sonigas la "r" sed ordinare ne trilas ĝin. Li prononcas karto, parko kaj similajn, samkiel kato, pako. La aŭtoro avertas al legantoj ne "gluti" la finsilabojn ŝajnas precipe aplikinda al rusoj, kiuj ne nur parole sed ankaŭ skribe (ekz. en "La Vojo al Klerigo") ellasas la "aŭ"-finiĝon, uzante "ante, balde, anstat, kontr" kaj cetere.

La afero meritas esploron de lingvaj gvidantoj; d-ro Privat tre supozeble respondos, ĉar la diroj de s-ro Krysta rekte kontraŭas liniojn en ties "Historio de Esp."

Ni iom kritiku la kritikanton. Ŝajne nacieca influo kuŝas en la formoj, "Ĝis la nacioj ekkonos, kio estas nacieca en ilia esperanta prononcado...ili certe penados forigi ĉi tiun maloportunaĵon" (Legu: **Kiam** la nacioj...); "Ĝis vi estos vizitinta kelkajn kongresojn, vi komprenos ĉiujn paroladojn" (Legu: **Kiam** vi...); "kun la deziro, ĝi donu utilon" (...deziro, ke ĝi...); "tio ne tiel gravas, ol paroli" (...gravas, **kiel**...). Krome, uzante "empire" (empirie) kaj "birokratismo" (burokratismo), li lasas la pordon al ankoraŭa danĝero. Sendu 2 respondkuponon al la supra adreso.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere. Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A. Skribu al Sekretariino.

**Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo.** Prezidanto, S-ro Johns; Sekretario, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro Jas. P. Lauder. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road Epsom.

**Melburna Esperanto-Societo,** Prezidanto, s-ro P. Holmes; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots Church Hall, 97 Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

**Sydney Esperanto Society.** Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbane Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBEA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

**Wellington Esperanto Club.**—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34. Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A. Del. U.E.A. Write for book list.

